

permesas la eltiron de konkludo, ni trovas restantaj certajn asociojn en kiuj konkordo de elekto indikas ion, kio nekonscie gvidas la elekton. Ŝajnas, ke ĝi estas faktoro de rasa karaktero, tute nedependa de individua sperto. Ĝi povas esti klarigata per la supozo ke, *kiam emociaj rilatoj estis establataj kun koloraj objektoj, je stadio antaŭ ol la lingvo sufiĉe evoluis por uzi adjektivajn kolor-nomojn, tiuj objektoj, kiuj poste klasifikiĝas sub tiaj nomoj kunportis iom el la emociaj signifoj, kiujn portis la pli fruaj objektoj.*

Mi ne pretendas esti pruvinta ĉi tiun teorion, tamen ĝi klarigas la konatajn faktojn, kaj en la malesto de pli bone establita teorio, estas racie sekvi ĉi tiun kaj provi etendi ĝin en aliajn sferojn.

LINGVA KAPTO DE STRUKTUROJ

far D-ro Inĝ-o G. HAMMING.

1. Funkcia gramatiko.

Lingviston imagu. Li ĵus trovis malnovan manuskripton. La lingvon li posedas, tamen la manuskripto enhavas nekonatan esprimon. Kion signifas la esprimo?, jen la problemo por la lingvisto. Donajo estas la lingva formo; studenda ĝia signifo, la penso.

Imagu scienciston. Li cerbumis pri malfacila problemo, eble pri atomoj, eble pri la homa ekzisto. Fine li havas klaran penson, kaj volas diri ĝin al aliuloj. Kiel tio povas? Ne uzeblaj estas la esprimoj kiuj jam ekzistadas; ili ja ne signifas la novan ideon. Nek uzeblaj estas esprimoj kiuj ne jam ekzistas; ilin oni ne komprenos. Koncepton novan kaptis la sciencisto, — kiel esprimi ĝin? Donajo estas la penso, problemo la formo lingva, la esprimo.

El du fontoj venas du sintenoj: naturecismo kaj skemismo. Kontraŭ Volapük sin defendis Esperanto per la naturecisma principo, pro Ido la skemismon ni batalis, — nun iuj serĉas lingvon kiu estas malpli skemisma ol Esperanto, pli naturecisma: Occidental, IALA, la Angla estu nomataj. Rimarkinde estas ke lingvistoj emas al la naturecismo, naturscienculoj al skemismo. Ĉu eble nia propra naturecismo kontraŭ Volapük, nia malsato de skemismo kontraŭ Ido nun malfortigas nin kontraŭ Occidental? Verŝajne, tamen malprave.

Ne malhelpas skemismon la naturecismo, kiun Esperanto defendis kontraŭ Volapük klarigante ĝian malsukceson. *Se vi volas elekti vorton, preferu internacie konatan.* — jen la naturecismo de Esperanto. La formoj de Volapük ne estis konataj.

La skemismo de Ido ne maltaŭgis, sed la kompletemo. Distingi ĉiun nuancon oni volis. Kontraŭ tio ni metis la principon de sufiĉo kaj neceso. Sur la sama principo baziĝas ĉiu scienca laboro; tre skemisma entrepreno.

Post naturŝtonoj kaj ligno venis ŝtalo kaj betono; post tio nostalgio kaj mal-racio. Idon sekvis Occidental, kie nostalgio venkis la planon. Laŭ Occidental

naturalismo enhavas la rajton kunmeti vortojn; tamen nur tiuj kunmetaĵoj estas uzindaj, kiuj jam ekzistas en unu el la Latinidaj lingvoj.

Vidu la diferencon: La naturecismo de Esperanto petas ke oni preferu konatan formon, la naturalismo de Occidental malpermesas nekonatan. Malpermeso estas ŝtonigo, kaŭzo de malsimpla; ĝin gramatiko neniam enhavu!

Gramatikon verki analizan, jen laboro kaj tasko de lingvisto. Por li la lingvaj formoj estas elirpunktoj. Tiujn li analizas. La sciencisto bezonas alian gramatikon. Komenci ĉe la penso li volas; studi kiel la lingvo ebligas esprimi la novajn ideojn. Gramatiko funkcia demandas, kiujn funkciojn la lingva mekanismo devas posedi. Ne la lingvo estas normo, sed la penso. Sciencaj pensoj estas skemismaj. Ordinare ili devias de la kutimo nur pro neceso. Tia estu funkcia gramatiko.

2. Strukturoj.

Imagu horloĝon. Ĝi konsistas el radoj, ŝraŭboj, montriloj ktp. Imagu ke vi malmuntas la horloĝon. La radoj kaj aliaj konsistigaj partoj restas la samaj. Tamen la horloĝo malestiĝas. Horloĝo havas *strukturon*, kiu foriĝas pro malmunto. Ĉe horloĝo (*strukturajo*) ni devas distingi strukturon kaj konsistigajn partojn (la *strukturanoj*); ili kvazaŭ loĝas en la strukturo.

Inter la partoj de muntita horloĝo regas la ĝustaj *rilatoj*. Strukturanoj povas formi strukturajn nur, se ili ĝuste interrilatas. *La rilato inter la strukturanoj estas la strukturo de la strukturajo.*

Imagu pentritan pejzaĝon. Ĝi estas unu strukturajo. La pentrinto vidis tion. Strukturanoj estas arbo, vojo, ĉevalo. Se li promenas en pejzaĝo li ofte ne vidas ĝian unuecon. Por li la arbo, vojo, ĉevalo ne estas strukturanoj; ili estas *ajoj*. Inter tiuj aĵoj povas ekzisti *rilatoj*. Eble la ĉevalo kuras sur la vojo.

Resume: En la mondo ni distingas aĵojn. Inter tiuj aĵoj ni povas vidi rilatojn. Se rilato faras el kelkaj aĵoj tuton, la tuto nomiĝas strukturajo; ĉi-kaze la rilato nomiĝas strukturo, kaj la aĵojn mi nomas strukturanoj.

3. Nocioj.

Bovon imagu, kaj scienciston kiu studas ĝin. Li distingas kelkajn konsistigajn partojn, haŭton, kapon, karnon, kruron. Tiuj partoj estas aĵoj. La aĵoj ne klare distingiĝas; kapo ja parte estas haŭto, haŭto parte estas kapo. La analizo de strukturajo laŭ konsistigaj partoj dependas de la homa menso. En tiu menso troviĝas partiga skemo, la *koncepto* pri la strukturajo. Evidente povas esti malsamaj konceptoj pri unu studataĵo samtempe.

Koncepto estas partiga skemo. Ĝi proponas kvazaŭ fakojn, kien oni povas meti la aĵojn distingendajn. Sur ĉiu fako troviĝas etikedo, kiu montras la nomon de la fako. La fako estas *nocio*, la nomo *termino*.

Scienco estigas kaj ordigas nociojn kaj ideojn; funkcia gramatiko vidigas kiel oni povas surglui taŭgajn terminojn kaj esprimojn.

4. Amasoj.

Biologon imagu, kiu trovis al li nekonatan beston aŭ herbon. Por trovi la nomon li uzas determinan katalogon. Determininte li nomas la ajon *hipopulumus esperujensis*. Pro kio li nomas ĝin nun per tiu termino? Estas kelkaj motivoj; la tuta motivaro troviĝas en la katalogo.

Same katalogo mencias la motivaron, pro kiu oni nomas alian estajon ĉevalo. Ĉi tiu motivaro nomiĝas *ĉevalco*.

Multajn bestojn oni nomas ĉevalo, kune ili formas la *amason* de ĉevaloj. Per la vorto ĉevalo oni indikas nur, ke temas pri iu ano — ĉi-kaze ĉevalcano — el la tuta amaso. Ofte tio sufiĉas, ekz. se oni diras ke ĉevalo havas kapon kaj voston.

En aliaj kazoj tio ne sufiĉas; por sufiĉe difini la beston oni devas malpli-grandigi la amason. El ĝi oni prenu parton, *subamason*; ekz. „blanka ĉevalo” aŭ „mia ĉevalo”. En ĉi tiu artikolo mi volas esplori nur unu rimedon por malpliigi amason. Per *rilato* oni povas pli difini la anon de iu amaso.

5. Substantivo kaj adjektivo.

Ajon oni povas indiki per *substantivo*; ĝi konsistas el radiko kaj la finaĵo -o. La radiko estas la nomo de la nocio, kies ano la ajo estas laŭ nia koncepto.

Por pli difini la ajon oni povas mencii alian ajon, kiu havas rilaton al la unua. Tian helpan ajon oni povas indiki per *adjektivo*, radiko kun finaĵo -a. Ekz.: floro ĝardenata.

La rilaton la adjektivo ne klare indikas. „Mia posedaĵo” vidigas alian rilaton ol „mia posedanto”. Mia patro ŝiras mian skribaĵon por mia edukado; la vorto „mia” indikas sinsekve parencecon, subjekton de ago kaj objekton de ago. La rilatoj estas klaraj, oni ne precizigu ilin.

Ofte la rilatoj ne estas klaraj. Ilin oni povas precizigi per *prefikso* antaŭ la adjektivo. Ekzemploj estas: herbo enĝardenata, semo porĝardenata, arbo eksterĝardenata.

Adjektivo malsimpla mi volas nomi adjektivon, kiu konsistas el prefikso, radiko kaj finaĵo; *adjektivo simpla* konsistas el radiko kaj finaĵo. Estas bone rimarkigi ke multaj naciaj lingvoj ne posedas malsimplajn adjektivojn; tiuj lingvoj ne povas uzi ilin kiel elirpunkton por plua studado. Tial mi devis verki ĉi tiun studaĵon per Esperanto.

La forma diferenco inter substantivo kaj adjektivo donas *liberan vortordon*. Semo por ĝardeno estas porĝardenata semo. Ni gardu ke la lingva kutimo ne forprenu tiun liberon.

6. Prepozitivo.

Anstataŭ adjektivon malsimplan oni povas uzi *prepozitivan*: la prefikso malligiĝas kaj fariĝas *prepozicio*; la radiko prenas substantivan finaĵon. An-

stataŭ „floro enĝardenata” oni povas diri „floro en ĝardeno”. Ankaŭ adjektivo simpla povas fariĝi prepozitivo, nun oni devas elekti prepozicion; plejofte oni uzas *de* aŭ *je*, ĉe materialoj *el*: ora bovido — bovido el oro.

La prepozitivo havas sian avantaĝon: kvankam fakte temas pri adjektivo, la centra radiko prenas substantivan finaĵon. Ĝin povas precizigi alia adjektivo. „Serpento en arbo apudĝardenata” vidigas la prepozitivan „en arbo apudĝardenata”, kiun oni apenaŭ povas aliformi al adjektivo malsimpla.

Malavantaĝo de la prepozitivo estas, ke la libera vortordo perdiĝis. „Ordo sen trafiko” ja ne estas „trafiko sen ordo”. Eĉ estas diferenco inter „sen trafiko ordo” kaj „ordo sen trafiko”. La unua esprimo estas koncizaĵo anstataŭ: sen trafiko (estos) ordo.

El ĉiu adjektivo ni povas fari jen substantivon jen adverbon. Ĉe la prepozitivo oni ne povas distingi tiujn uzajn. Tamen ili oftas.

En la ĝardeno estas bele — La enĝardeno estas bela.

Arbo en la ĝardeno floras — Arbo enĝardenata floras.

Virino vestita laŭ la modo — Virino laŭmode vestita.

— Laŭmodo multe kostas.

Do la adjektivo malsimpla facile vidigas la taskojn de la prepozitivo.

7. Kazo kaj okazo.

Imagu kapron ĉe akvo. Ĉi-kaze ĝi povas trinki. Ĉi-kaze! Ne la imago estas kazo, sed „kapro ĉe akvo”. Kapro ĉeakva ne estas kazo, sed nocio, indikata per duvorta termino. La termino „kapro ĉeakva” indikas ajon; la termino „kapro ĉe akvo” indikas la saman ajon, samtempe indikante ke la ajo estas *strukturajo*. Kapro kaj akvo estas la du *strukturanoj*, la prepozicio montras la *strukturon*, la *rilaton* inter la du strukturanoj. Do: *por indiki rilaton inter du ajoj ni povas uzi prepozicion*, jen regulo el funkcia gramatiko. Simila regulo el analiza gramatiko tekstus: prepozicio indikas rilaton inter du ajoj. Ni vidos ke ankaŭ tiu regulo veras.

La *ĉefa* strukturano metiĝas antaŭ la prepozicion; tiun sekvas la *flanka* strukturano. La flanka strukturano logike originas el la adjektivo.

Portiko antaŭ palaco; kazo imagebla. Portiko antaŭas la palacon, jen aserto, ĉu vera, ĉu malvera. Se la aserto estas vera, ĝi mencias *okazon*. Kaj kazo kaj okazo montras strukturajn. Por ke strukturajo estu efektiva, ĝi bezonas lokon en la tempo. Tiun lokon indikas la prepozicio iĝante *verbo transitiva*.

Kaj verbo transitiva kaj prepozicio indikas la rilaton inter strukturanoj; la nura diferenco estas ke la verbo metas la strukturajn en la efektivan.

Estas diferenco inter nocio kaj termino (vidu § 3). Termino estas lingva rimedo por indiki nocion. Okazon oni indikas per *prepozicio konkreta*; kazon per *prepozicio abstrakta*. Do „muso sur muro” estas prepozicio abstrakta; „muso suras muron” prepozicio konkreta.

Verbo transitiva ligas du strukturanojn, la *aktivan* kaj la *pasivan*. La

pasiva strukturano alprenas la *akuzativan* finaĵojn -n; la aktiva ne prenas ekstran finaĵojn, ĝia formo nomiĝas *nominativo*.

Kvazaŭ por fari la terminojn konfuzaj oni nomas akuzativon kaj nominativon *kazoj*. Estus pli bone nomi ilin *modifoj*. En Esperanto la vorto povas havi multajn modifojn: biciklo, bicikla, biciklon, bicikle, bicikli respondas sinsekve al la Latina nominativo, genitivo, akuzativo, ablativo, infinitivo. Ne estas interna motivo nomi kelkajn el ili kazoj, kaj la aliajn ne; ĉiuj estas modifoj.

El la propozicio abstrakta *portiko antaŭ palaco* mi faris la konkretan *portiko antaŭas la palacon*. La ĉefa strukturano fariĝis strukturano aktiva, *subjekto*; la flanka strukturano nun estas la strukturano pasiva, la *objekto*. Ankaŭ povas okazi ke la flanka strukturano fariĝas subjekto:

peto per amiko — la peton peris amiko,
poemo far poeto — poemon faras la poeto.

Evidente en analiza gramatiko troviĝas la regulo: Kelkaj prepozicioj povas esti verbaj radikoj.

Ĉar nia gramatiko ne havu esceptojn la regulo estu:

Ĉiuj prepozicioj povas esti verbaj radikoj.

Muso sur muro — muso suras muron.

Viro en ĝardeno — viro enas ĝardenon.

Homo ĉe besto — homo ĉeas beston.

Arbaro ĉirkaŭ urbo — arbaro ĉirkaŭas urbon.

En la ekzemploj mi faris el la ĉefa strukturano la subjekton. Tio estas preferinda, se la flanka strukturano ne estas evidente aktiva.

Ni vidis ke kelkaj radikoj de transitivaj verboj estas prepozicioj. Ĉar nia gramatiko ne havu esceptojn, la regulo estu: Ĉiuj radikoj de verboj transitivaj povas esti prepozicioj. Aŭ, malpli depende de la Latina: Radiko de transitiva verbo nomiĝas prepozicio.

Ĉu la subjekto fariĝu ĉefa aŭ flanka strukturano en la propozicio abstrakta? Por ĉiu prepozicio oni ankoraŭ devas difini tion. Tio ja ne estas urĝa tasko! Sufiĉas se la gramatiko vidigas la eblon. Oni faros tion laŭbezone. Mi nur donu kelkajn ekzemplojn:

Rilat via sugesto mi volas rimarkigi ke vi stultulas.

Spit la malpermeso la knabo foriris.

Kaŭz manko de koncizo la poemo malbeliĝis.

Fin la strato staras domo.

Neologismoj la prepozicioj spit, kaŭz, far, rilat, ne estas; ili estas oficialaj radikoj, uzataj laŭ ekzistantaj gramatikaj reguloj. Nur la kutimo ne ĝenerale uzis tiujn regulojn.

Estas bone atenti pri la logistiko. Ĝi kreis signan lingvon, kiun oni ne povas laŭsigne laŭtlegi per naciaj lingvoj. Ni povu tion!

Esence la logistika lingvo posedas ne verbojn, nur prepoziciojn. La logiko

ja ne traktas faktojn kaj okazojn; ĝi studas kazojn, skemojn por la pensado. Ekzemplo de logistika frazo estas

$$A = B \ \& \ B = C \rightarrow A = C.$$

Ĝin oni povus laŭtlegi: A est B kaj B est C do A est C. Se mi nomas aĵojn anstataŭ literojn, la frazo povas esti: Bovo est herbo kaj herbo est besto do bovo est besto. La tuta frazo taŭgas, kvankam bovo ne estas herbo, nek herbo estas besto. Sed tion la kazoj ne diras; ili ne pretendas esti okazoj.

8. Keajo.

Arbo estas strukturajo, ĝiaj strukturanoj estas folioj, branĉoj, trunko, radiko; folio estas strukturajo, ĝiaj anoj estas ripoj kaj interripajo; interripajo estas strukturajo, ĝiaj anoj estas ĉeloj, kiuj estas strukturajoj.

Birdo sur arbo apud ĝardeno! La flanka strukturano „arbo apud ĝardeno” mem estas strukturajo. Nu, la kazo „arbo apud ĝardeno” povas esti okazo, „la arbo apudas la ĝardenon.” Tiu okazo povas esti strukturano. Por indiki ke okazo estas strukturano oni metas la partikulon *ke* antaŭ la propozicion. Ekz.: kverelo pro ke la arbo apudas la ĝardenon. Nun „ke la ĝardenon” estas la flanka strukturano. Tiam esprimon mi volas nomi *keajo*.

Keajo estas termino por indiki nocion, same kiel substantivo, propozicio abstrakta kaj kelkfoje prepozitivo. *Ke la homoj interbatalegas* estas miŝito. Ofte oni difinas terminon per keajo samsignifa. Antaŭ keajon oni povas meti prepozicion. Krome la keajo povas esti subjekto aŭ objekto de verbo. *Ke scienculoj asertas malkutimajojn* kaŭzas ke oni malamas ilin. Rimarku ke oni ne distingas subjekton kaj objekton per la formo. Kutime oni metas la subjekton antaŭ la verbon, kaj la objekton post ĝin. Se oni indikus la objekton per la partikulo *no*, oni havus pli da libereco kaj povus diri: No ke oni malamas scienculojn kaŭzas ke ili rompas la tradicion.

Ĉe keajon oni ne povas meti adjektivon. Ne eblas diri: „Mi aŭdas la gravan ke iu kaptis ideon”. Kutime oni diras: mi aŭdas la gravan *fakton*, ke La nura tasko de „fakto” estas, ke ĝi ligu la adjektivon al la keajo. Iom komplika metodo. Se eble oni faru el la adjektivo substantivon: mi aŭdas la *gravaĵon*, ke Tiu konsilo venas pli el la lingva tradicio ol el la racio. Estu.

Ĉe arbo viro trovis hundon. La frazo enhavas du rilatilojn: ĉe kaj trovis; temas pri du strukturoj. Unu strukturajo estas ano de la alia. La arbon ĉeis ke viro trovis hundon. Konstatu ke ĉiu prepozicio indikas rilaton inter strukturanoj; ofte unu strukturano estas okazo, kiun oni indikas ne per keajo sed per propozicio konkreta.

Frazoj kiuj enhavas pli ol unu verbon estas iom pezaj; prefere oni konkretigas la plej interesan rilaton per verbo, la aliajn oni indikas per prepozicio aŭ aliel.

Oni povas diri:

Ke la knabino amindumas naŭzas min.

La knabina amindumo naŭzas min.
 La amindumo far la knabino naŭzas min.
 La knabino amindumas naŭz mi.

9. Strukturoj propraj kaj rilataj.

Petro legas libron, ankaŭ Paŭlo legas. La verbo legi indikas la rilaton inter Petro kaj la libro; sed al kio Paŭlo rilatas, ĉu al libro, ĉu al letero? La verbo ne ĉiam indikas rilaton.

Petro legas libron, jen strukturajo. La verbo indikas la strukturon. La strukturo ne nur ligas Petron al la libro; ĝi ankaŭ kondiĉas Petron mem, lian propran strukturon. Leganta Petro havas alian strukturon ol Petro dormanta. Nu, la propra strukturo de Paŭlo similas al tiu de Petro. Ankaŭ Paŭlo legas.

Verbo jen indikas strukturon *propran*, jen strukturon *rilatan*. Ĉi tio estas distingo el funkcia gramatiko. Gramatiko analiza distingas inter verboj transitivaj kaj netransitivaj. Tiu distingo originas el naciaj lingvoj; la Fundamento de Esperanto ĝin malakceptas. Laŭ § 29 el la Ekzercaro ekzistas la regulo „ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t.e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri „obei al la patro“ kaj „obei la patron“ (anstataŭ „obei je la patro“)“.

Same ni rajtas diri:

Mi ridas lian naivecon.

Mi semas kampon.

Mi laboras la mendojn.

Mi dormas liton.

Mi iras Parizon.

Mi legas pri rakonto.

Mi pezas 72 kilogramojn.

Nur pro influo de Eŭropaj naciaj lingvoj oni ne kutimas uzi la eblojn, kiujn la Fundamento klare difinas. Ĉu tio faciligas la lingvon por Azianoj?

Mi ne kredas.

Ankaŭ laŭas la Fundamenton jenaj frazoj:

Mi legas el libro.

Mi legas per grandaj literoj.

Vere, la Esperanta gramatiko ne distingas inter verboj transitivaj kaj netransitivaj!

Mi legas el libro; mi legas libron. Ambaŭ frazoj taŭgas. Ĉu ili havas la saman signifon? Ne tute. La unua frazo vidigas du strukturojn; la strukturajo ke mi legas havas rilaton al la libro. „Mi legas libron“ indikas rilaton inter la libro kaj mi; „mi legas el libro“ vidigas rilaton inter la libro kaj mia propra strukturo: mi legas, el libro.

La plimulto el niaj verbaj radikoj povas indiki strukturon jen rilatan, jen

propran. Kelkaj saĝnas indiki nur strukturojn rilatajn. Tiujn verbojn oni povus nomi *devige transitivaj*.

Kion signifas: la hundo apartenas? Nenion; oni *devas* menciĝi la pasivan strukturanon. La verbo estas devige transitiva; la hundo apartenas min. Laŭ la lingva kutimo ĉi tiu verbo estas netransitiva! Laŭ la Fundamento tamen, oni rajtas uzi ĝin logike korekte.

Unu gravan fakton ni atentigu. Laŭ la Fundamenta Ekzercaro oni ne rajtas menciĝi du pasivajn strukturanojn ĉe unu verbo. Do verbo povas ligi nur du strukturanojn, Logike tiu regulo estas interesa. Ĝi diras ke *oni en la logiko nur bezonas agnoski rilatojn inter du aĵoj*. Se temas pri tri aĵoj oni antaŭe povas fari unu strukturajojn el du aĵoj. Tiun strukturajojn oni rilatigas al la tria aĵo. Por akcepti la aserton ni devas difini *vektoron* por gramatika uzo; pri tio iam.

Kaŝe Esperanto ofte uzas du objektojn ĉe unu verbo; nome se unu objekto estas keaĵo. Ĉe keaĵo oni ja ne rekonas la akuzativon. Do tute normala estas la frazo: mi petas vin ke vi obeu. Oni bezonas nek agnoski nek malagnoski rilaton inter tri strukturanoj.

10. Nia lingvo.

Per sia lingvo sciencisto pensas pri problemoj. Gramatiko analiza studas la lingvon; ĝi priskribas la regulojn laŭ kiuj la sciencisto pensas sponte. Ankaŭ la logiko studas la regulojn por la pensado de sciencisto. Se nur tiuj reguloj estus egalaj!

Funkcia gramatiko volas harmoniigi ilin; do tia gramatiko povas ekzisti nur por planlingvo. Almenaŭ se oni ne povas evoluigi naciajn lingvojn laŭplane.

Sciencistoj bezonas facilan komunan lingvon; ĉi tiu opinio ligas la plimulton el ni. Prave. Estos des pli facile por ni ju pli la lingvon regas logikaj principoj. Eĉ la plej facila kaj konkreta metodo por lerni la logikon estas: lerni logikan lingvon!

Ni bezonas komunan lingvon. Komuna al kiuj? Ĉu al la okcidentaj sciencistoj? Jes ankaŭ; sed ne nur. La lingvo devas esti komuna al okcidentuloj kaj Azianoj; ĝi devas esti same natura por ĉiuj nacioj, ĉiuj. Nur la logiko estas vere internacia.

La lingvo devas esti komuna al sciencistoj kaj simpluloj. Per la lingvo ni devas klerigi ilin. La lingvo, kiun ni instruas, la gramatiko, la vortaro, donas pli da klareco ol multaj traktatoj. Kial estas diversaj nacioj en la mondo? Parte pro la lingvoj. Apenaŭ estas etna diferenco inter Angloj, Nederlandanoj kaj Germanoj; estas granda diferenco en la naciaj spiritoj. La infanoj heredas tian spiriton per la nacia lingvo. Per Esperanto oni lernu racion kaj sentoplenon.

Lingvo estas socia fenomeno; unu persono ne povas decidi pri ĝi. Ĉu

